

THE BRITISH ESPERANTIST

The Official Organ of The British Esperanto Association.

VOL. I.—No. 7.

JULIO, 1905.

[PRICE ONE PENNY.
POST FREE, 1½D.]

KONGRESA TAG'.

De Ch. W. T. REEVE (Londono).

(Ario: "Funiculi-Funicula" de L. Denza.)

1.

El ĉiu lando venu al Bulonjo
Pretigu vin, pretigu vin.
Doktoro Zamenhof kaj Kongreso
Atendas vin, atendas vin.
Alportu Esperantan langon veran
Por la kunven', por la kunven'.
Forlasu hejme propran lingvon vian
Sen ia ĝen', sen ia ĝen'.

Horo.

Ni kunvenu por kongresa tag'.
En Bulonjon sub la verda flag'.
Malpaco ja ne daŭru plu:
Ne estas ni fremduloj plu;
Esperanta frato estas ne fremdulo plu.

2.

La kara lingvo jam tre dolĉa estas
Por skriba l'art', por skriba l'art'.
Sed veran plezuregon al ni donas
La parolart', la parolart'.
Nun ĉiu lando kantu unulingve,
En granda hor', en granda hor'.
Elsonu vocoj laŭte kaj pli laŭte,
Ĝis ĉies kor', Ĝis ĉies kor'.

GRAVO OPINIO.

La mez-junia numero de **Lingvo Internacia** enhavas pluan leteron de D-ro. Zamenhof. Li tute rajte miras, ke la mondo esperantista ne sufice multe sin okupas je la estonta kongreso. Li diras: "Mi opinias, ke niaj gazetoj devus pli multe paroli pri la kongreso, niaj grupoj en la tuta mondo devus fari la kongreson ĉefa objekto de ĉiuj niaj kunvenoj, priparoloj, zorgoj, pripen-sadi kaj pretigadi rimedojn por pli granda solenigo de la kongreso, sendi monon, ktp. Ili devus disvastigadi en siaj urboj kaj landoj oftajn sciigojn pri la estonta kongreso por ekinteresigi la mondron kaj allogi la neesperantistojn veni en granda nombro al la kongreso (kiel gastoj); sed kompreneble ili devas fari tion ĉi *lerte* kaj *takte*, evitante ĉian nelertan altrudadon kaj tedadon."

Pro manko de loko ni diras nur, ke al saĝulo suficias aludo.

Avizo.—La legantoj bonvole rimar-ku, ke la diversaj projektoj diskutotaj en la Kongreso estas eldonitaj kiel aparta broŝuro, kiu baldaŭ estos aĉe-tebla ĉe la Sekretario po 3 pencoj afrankite.

FAKO DE KORESPONDADO INTERNACIA. (F.I.K.)

26.—**Chippenham (England).**—S-ro. Harry L. Wiltshire, *Pierrepont House*, dez. koresp. kun alilandaj geesptoj. per ilus. p.k. Tuj kaj ĉiam respondos.

27.—**Spikov (Podolskaja gubernio).**

Russia).—S-ro. T. E. Moskovčenko, *St. Rařni-Lesovije*, dez. korespondadi kun alilandaj Esptoj. pri la foto-grafarto, Esp. propagando, k.a. Ĉiam adresu kovertojn k.c. Espte.

KRONIKO.

Grupo de Plymouth.—Nia monata kunsido okazis la 7an de Junio, sub la prezido de D-ro. T. G. Vawdrey. La regularo, pretigita de la komitato en ĝia kunsido de la 10a de Majo, estis proponita al la grupanoj kaj unuvoĉe aprobita de ili. La komitato kaj la grupanoj decidis presigi 100 ekzemplerojn de la regularo kaj disdoni ilin al siaj amikoj. La grupo ankaŭ unuvoĉe decidis sendi S-ro. Thill, kiel oficiala reprezentanto al la Bulonja Kongreso. Antaŭ kelkaj semajnoj S-ro. Thill sendis al la bonekonata kor-nuba romanverkisto, S-ro. A. T. Quiller-Couch (Kūler Kuē) paketon da Esperanta literaturo, revuoj, k.t.p., petante ke li nek aprobu nek malaprobu Esperanton antaŭ ol li estas leginta (1^o) "La Lingvo Esperanto," de R. J. Lloyd, D.Litt., M.A.; (2^o), la lernolibron de D-ro. O'Connor; (3^o) La paroladon de S-ro. Evrot faritan en Bourg, la 5an Februaro de 1905a. La honorinda literaturisto bonvolis legi tra tiuj ĉi libroj kaj sendi al la sekretario de la Plymouth'a Grupo la sekvantan respondon:—

"Kara Sinjoro,—Multajn dankojn pro la libroj pri Esperanto. . . . Esperanto certe havas la unuan meriton kiuj internacia lingvo devas havi—ĝi estas admirinde simpla. Mi miregas pri la facileco laŭ kiu ĝi estas tradukebla, eĉ de iu, kiu dediĉis al ĝi nur malmultaj minutoj da lernado—kaj tiuj, nur al la fonetiko—aŭ pli guste, mi devas diri, pri la facileco laŭ kiu oni povas ekkapti la sencon, kaj pri la granda proporcio da vortoj kiujn oni tuj povas rekonii. Mi timas, ke la penadoj por estigi pli bonan interkompreneigon inter la nacioj ŝajne estas nuntempe sub nubo. Tamen, spite tiuj ĉi maladmin-daj militadoj, grandega progresado estas farita dum tute frēsaj jaroj. Estas okazo por diri, 'Ne diru, ke la batalado estas vana.' Mi kredas al kiel eble plej plena libereco por interسانgado de penso inter nacioj. Duono de la malpacoj de l' mondo venas de tio, ke la popoloj ne havas la eblon kompreni unu la alian, kaj ia komuna lingvo multe pli farus por la internacia paco, ol kia ajn nombro da traktajoj. Mi dubas, ĉu Esperanto

CHRONICLE.

Plymouth Group.—Our monthly meeting took place on June the 7th, Dr. T. G. Vawdrey in the chair. The rules the committee drafted on May the 10th were submitted to the group and unanimously approved by the members. The committee and members resolved to have a hundred copies printed to distribute among their friends. The group also unanimously decided to send Mr. J. A. Thill as their official representative to the Boulogne Congress. Some weeks ago Mr. Thill sent a small parcel of Esperanto literature to the well-known Cornish novelist, Mr. A. T. Quiller-Couch, asking him neither to approve of nor to condemn Esperanto before having read (1) Dr. Lloyd's "Esperanto Language"; (2) Dr. O'Connor's Text Book; (3) Monsieur Evrot's "Conférence sur L'Esperanto." The worthy *littérateur* was kind enough to read these books and to send the following reply to the secretary of the Plymouth Group:—

"Many thanks for the books on Esperanto. . . . Esperanto certainly has the first merit an international language should possess—it is admirably simple. I am surprised at the ease with which it can be translated, even by one who has not given more than a few minutes' study to it, and that to the phonetics only, or rather, I should say, at the ease with which the meaning can be seized and the large proportion of words that are at once recognisable. I am afraid that efforts to promote a better understanding between nations appear to be under a cloud just now. Yet, as a matter of fact, and in spite of these hateful wars, enormous work has been done during quite recent years. It's a case of, 'Say not the struggle naught availeth.' I believe in the fullest possible Free Trade in thought between nations. Half the quarrels in the world come from folk's inability to understand one another, and a common language would do more for international peace than any number of treaties. I doubt Esperanto will ever be a literary language, but as a means of communication

iam estos literatura lingvo, sed kiel rimedo de komunikado inter diversaj nacioj, mi esperas, ke ĝi havu grandan estonton.—Vere via,

“A. T. QUILLER-COUCH.”

Grupo de Hastings.—La prezidanto jus starigis *La Hastings'an Rondiranton*, kiu estas private eldonata gazeto. Ĉiu leganto, kiam li estas leginta la artikolojn de siaj kunanoj devas verki kaj enskribi sian propran aldonon en Esperanto antaŭ ol li forsendos la gazeton rondiranten. Tiamaniere, tiuj membroj kiuj restas for de l' hejmo povas tamen komunikigi kun la aliaj kaj junaj studentoj ebligas esprimi siajn pensojn kaj ideojn per la lingvo, kritikante kaj diskutante la verkojn de la ceteraj. La sekretario arangis, ke vaporŝipo irados inter Hastings kaj Bulonjo por transporti personojn dum Kongresa semajno.

Grupo de Battersea.—Dum la daŭro de la someraj monatoj la anoj de tiu ĉi grupo sage decidis daŭrigi siajn kursojn eksterdome. Ĉe la orkestrejo en Battersea Park oni trovos anojn de l' grupo ĉiudimanĉe je la 11a. Serĉu la verdan stelon!

Grupo de Dover.—La ĉiuvara kunsido de la Grupo de Dover okazis la 1^{ma} de Junio. S-ro. Cowper prezidis. S-ro. Chitty (hon. sekretario) raportis pri la progreso de la klubo dum ĝia unua jaro kaj klarigis la financan situacion de la grupo, kiun li montris kontentiga. Diskuto postvenis pri la vizito de Esperantistoj Doveron el la Bulonja Kongreso en Aŭgusto proksima kaj komitato estas elektita por klopodi pri la acceptado de vizitontoj, por kio la Ĉambro de Komerco estas doninta du gineojn. La Urbestro, Sir William Crundall, al kiu oni voĉdonis esprimon de sincera danko pro lia persona amikeco je l' Grupo, estas elektita prezidanto, kaj S-ro. Chitty hon. sekretario. Baldaŭ estos komencataj kursoj por la eklernantoj.

Klubo de Deal.—La lernantoj, kiuj deziras plilertigi je la parolado de nia lingvo per praktiko konversacia, antaŭ la Kongreso, povas trovi bonajn okazojn tion efektivigi en la tre saniga marbana urbeto Deal. La tiea klubo ne estas multnombra, sed ĝi enhavas kelkajn gestudantojn (precipe ĉe la

between various peoples, I hope that it has a great future.—Believe me, yours very truly,

“A. T. QUILLER-COUCH.”

Hastings Group.—The president has just started *The Hastings Rondiranto*, which is a privately circulated gazette. Each reader, when he has read the articles of his fellow-member, writes for inclusion his own addition in Esperanto before he sends the gazette on its rounds again. Thus, those members who are visiting away from home can keep in touch with the others, and young students are enabled to express their thoughts and ideas in the language by criticising and discussing the works of the others. The secretary has arranged that a steamship shall ply between Hastings and Boulogne to carry passengers over during Congress week.

Battersea Group.—During the summer months the members of this group have wisely decided to continue their classes in the open air. At the bandstand in Battersea-park, members of the group will be found every Sunday at 11 a.m. Look out for the green star!

Dover Group.—The annual meeting of this group was held on June 1. Mr. Cowper presided. Mr. Chitty (the hon. secretary) reported as to the progress of the club during its first year, and explained the financial position of the group, which he showed to be satisfactory. A discussion followed as to the visit of Esperantists to Dover from the Boulogne Congress in August next, and a committee was elected to deal with the reception of visitors, towards which the Chamber of Commerce has given two guineas. The Mayor, Sir William Crundall, to whom a vote of sincere thanks was accorded for his personal kindness to the group, was elected president, and Mr. Chitty hon. secretary. Classes for beginners will soon be started.

Deal Club.—Learners who desire to improve themselves in speaking the language, by conversational practice before the Congress, can obtain good opportunities for this purpose in the very invigorating watering-place Deal. The club is not a large one in point of numbers, but it contains some very

fraŭlinoj), tre fervorajn; oni uzadas diversajn rimedojn por oftaj agrablaj interparoladoj. Kelkafoje oni kunvenas societeme, kaj partoprenas en Esperantistaj ludoj, kantas gajajn horajojn, deklamas aŭ legas poemojn kaj amuzajn rakontetojn, helpate de kelkaj apudklubanoj. Somere, oni aranĝas ekskursetojn, promenetojn tra la kampoj, kaj kunvenetojn subĉielajn en ĝardenoj aŭ sur la marbordo. Dum la ofta ludado—per bona musikbando el la proksima soldatejo—oni distingas, per verdaj steloj kelkajn kungrupigitajn segojn rezervitajn por klubanoj kaj vizitantoj, kiuj deziras interparoladi. Al ĉiuj aligrupanoj nialandaj aŭ fremdaj la Deal'a Klubo ĉiam faros tre koran akcepton, escepte dum la daŭro de la Bulonja Kongreso. La hon. sekretario ĝoje ricevos avizon de vizitontoj.

Londona Esperantista Klubo.—La membroj de tiu ĉi Klubo de nun kunvenos ĉiuvendrede, de la 6a ĝis la 9a horo vespere, ĉe St. Bride's Institute, Bride-lane, Fleet-street, kiam vizitantoj estos ĝoje akceptataj. Kelkaj membroj muzikamantaj ankaŭ kunvenas por kantekzerciĝado laŭ la gvidado de S-ro. Arthur Trickett, kiu donas sian satatan servon kiel instruisto kaj muzikverkisto. Generala kunsido okazis en Junio por decidi pri elektado de delegitaj konsilantoj por la Brita Esperantista Asocio kaj delegitoj por la Bulonja Kongreso.

Ni ekscias plezure, ke kelkaj el niaj legantoj mendas sian ekzempleron de la B. E. ĉe la kutimaj ĵurnalvendistoj, anstataŭ ĝin aboni rekte ĉe ni. Unu el ili faras tion en la kondiĉo, ke la vendisto elmontru lian ekzempleron en sia butika fenestro dum la 3 aŭ 4 tagoj antaŭ ol li venos por preni ĝin, kaj sekve nia gazeto estas nun aĉetebla ĉe E. Born, 50, Copthall-avenue, London-wall, E.C.

Parizo.—Hôtel du Borysthene, 30, Rue de Vaugirard, kontraŭ Luxemburg kaj Palais du Sénat. Apartamentoj kaj dormoĉambroj. Moderaj prezoj. Loĝejo rekomidata. Mastro: E. Houbart.

enthusiastic students—especially of the fair sex; various means are adopted for affording frequent opportunities for pleasant conversation. Social meetings are held for Esperanto, games, chorus singing, recitations, or readings of poetry, and amusing anecdotes, members of neighbouring clubs assisting. During the summer short excursions, rambles through the fields, and small open-air gatherings are held in gardens or on the beach. During the band performances—an excellent military band from the neighbouring barracks—small groups of chairs, marked with the green star, are reserved for members and visitors wishing for Esperanto conversation. Members of any other groups, British or foreign, will be welcomed by the Deal Club, at any time (except during the Boulogne Congress). The hon. secretary will be glad to hear from intending visitors.

London Esperanto Club.—The members of this Club will in future meet every Friday at St. Bride's Institute, Bride-lane, Fleet-street, when visitors will be gladly welcomed, between 6 and 9 p.m. Several members who are music-lovers also meet for singing practice, Mr. Arthur Trickett giving his valued services as teacher and composer. A general meeting was called in June to decide upon the election of delegate councillors for the British Esperanto Association, and to appoint delegates to the Boulogne Congress.

S-ro. J. Niedermann, el Southampton, skribas al ni: "Kiel rezultato de mia forsendo de lernolibro Esperanta kaj ekzempleroj de 'Suno Hispana,' per pero de la ĉi tiea kolombia Konsulo, mi legis en du sinsekvas numeroj de la kolombia ĵurnalo, *El Correo del Cauca*, du longajn artikolojn tre favorajn por Esperanto, verkitajn de S-ro. M. Arango el Calo, kiuj, laŭ tio, kion mi eksciis de la nomita Konsulo, jam entuziasmigis kelke da Kolombianoj."

Deerhaddnn College
59, BRIXTON HILL, S.W.
Edukatinoj, logantaj kaj dumtagaj,
el ĉiuj landoj estas akceptataj.
Pri prezaro kaj kondiĉoj sin turnu al
FRAULINOJ E. & B. WALKER.

Kampovojetaj Vagadoj. — Kelkaj Londonaj Esperantistoj intencas fari ekskursojn en la ĉirkaŭan kamparon dum la somero. Tiaj povos liveri agrablan okazon por interparoli Esperante, kaj oni do klopodas aranĝi kampvojajn promenadojn. Tiuj okazos ĉiun sabaton posttagmeze, kaj tiuj, kiujn la propono interesas, povas ricevi detalan programon de S-ro. H. Clegg, 52, Constantine-road, Hampstead, N.W.

Novaj Propagandiloj. — Por altiri atenton al la venonta Kongreso, la Asocio ĵus eldonis poštkarton kiu surhavas portreton plej novan de D-ro. Zamenhof kaj avizon pri la dato kaj loko de tiu Kongreso. La kosto estas tre malgranda (po 6p. por 12 ekz., afrankite) kaj ni esperas ke la Esperantistoj penados laŭ sia tuta povo alcentrigi per tiuj kartoj la atenton de la mondo al tiu ĉi epokfaranta okazo.

Alia poštarto ankaŭ estas pretigita, portanta la konsilon al ĉiuj en ses lingvoj lerni Esperanton. La kosto estas po 6p. por 30, afrankite.

Antaŭ nelonge vi petis de mia frato sciigojn pri la progresado de nia grupo. La **Malta Grupo** naskiĝis je Kristnasko de 1903a; la grupo ŝajnis forta kaj antaŭvidigis rapidegan vastiĝon, sed pro diversaj cirkonstancoj la kunvenoj iom post iom maloftiĝis, la fervoro malgrandiĝis, kaj la rezultato estis preskaŭ-mortiga por nia kara lingvo.

En Rabato, simpatia vilago, kiu antikve ludis la rolon de ĉefurbo, kaj kiu sidas sur monteto pli ol dekdu kilometrojn malproksime de Valeto, troviĝas pli ol dudek Esperantistoj. Ekrimarkinte ilian foreston el la kunvenoj esperantistaj pro tiom da interspaco, mi proponis al ili la fondon de dua grupo; tio fariĝis, kaj mi ĝoje akceptis la honoron ĉeesti tiujn kunvenojn. Elementaj kursoj jam estis enkondukitaj de Pastro Tomeo. La enkonduko de rondiranta gazeto ankaŭ havis bonegajn rezultatojn.

Ni havas do nun du grupojn. Ambaŭ konsistas el fervoraj anoj, bone progresadas, kaj mi esperas, ke ili baldaŭ donos bonan frukton. Almenaŭ tio estas mia plej kara deziro, kaj miaflanke mi neniam ĉesos enigi

Field-Path Rambles. — A few London Esperantists propose excursions into the surrounding country, which would furnish an agreeable opportunity for conversing in Esperanto, and therefore steps are being taken to arrange field-path rambles. These will be fixed for Saturday afternoons, and those who are interested in the suggestion can obtain a detailed programme.

For Propaganda. — In order to draw attention to the coming Congress, the Association has just published a postcard which bears the latest portrait of Dr. Zamenhof, and a notice as to the date and place of that Congress. The cost is very low (6d. for 12, post free) and we hope that Esperantists will do their utmost by means of these cards to concentrate the attention of the world to this epoch-making event.

Another postcard has also been prepared, advising everyone, in six languages, to learn Esperanto. The cost is 6d. for 30, post free.

en la du grupanarojn la fervoron kiu estas en mi, por atingi nian sanktan celon. **D-RO. G. BUSUTTIL.**

FARES FROM LONDON TO BOULOGNE.

August 3, 4, 5, returning August 7 and 8.

Saturday, about 2.20 p.m., returning Monday, 7.10 p.m. 1st Class throughout, £1 1s.; 3rd Class and saloon on steamer, 16s. 6d.; 3rd Class rail, 2nd Class on steamer, 12s. 6d.

Thursday or Friday, 10 a.m. or 2.20 p.m., returning Monday or Tuesday, 7.10 p.m. 1st Class, 30s.; 2nd Class throughout, 25s.; 3rd Class rail, 2nd on steamer, 17s. 10d.

Tickets at the above fares can be obtained from Messrs. Thos. Cook and Son (P. 2 Dept.), Ludgate Circus, London.

N.B. — In order that special carriages or compartments may be reserved, all who intend to take advantage of above trains should write to Mr. C. W. Reeve, 40, Crofton-road, Camberwell, S.E., stating time and class.

Meksika Lumturo (ciudumonata jurnalo, jarabono 3 fr., ĉe *D-ro. A. Vargas, Santa Rosa Necoxtla, Ver., Mexico*) donas tre kuragigajn sciigojn pri la aktiva propagando en Meksiklando kaj alioke en la Nova Mondo. Antaŭnelonge ĝi malfermis monferadon por la Kongreso kaj jam povis sendi al S-ro. Michaux pli ol 500 fr. La Revuo, kvankam negranda, estas bone redaktata kaj enhavas interesajn artikolojn en bonstila Esperanto; kiel specimenon, ni elcerpas la sekvantajn verajn vortojn de artikolo de S-ro. Ramón Limones :—

“ Kiam al amiko, kiu ankoraŭ ne konas Esperanton, vi parolas pri la strukturo de nia lingvo, ofte li diras :

“ ‘ Ja, ĝi estas mirinda, per kelkaj plibonigoj ĝi estos perfekta. Mi proponus ŝangi tion kaj tion ĉi, k.t.p.’ ”

“ Se li ellernas Esperanton, li iom post iom rimarkas ke ĝi estas pli perfekta ol li unue kredis, kaj fine li konfesas ke Esperanto ne bezonas tiom da plibonigoj kiom li pensis.

“ Kiom da leteroj plenaj je proponoj pri plibonigoj ricevis D-ro. Zamenhof! Nur li povus tion diri. Li ĉiam respondas ĝentile per afablaj vortoj, nenion dirante pri la proponitaj plibonigoj. Alia pli fiera ne respondus, aŭ respondus tion ĉi : ‘ Esperanto estas netuſebla ; akceptu ĝin tiel kiel estas aŭ donu al mi pacon.’ Ne ! Li respondas afable, nenion dirante pri la proponoj ; ĉar li bone scias ke la proponantoj mem konvinkigos, iom post iom, pri la senneceso de plibonigoj.

“ Volapuko, malgraŭ ĝiaj grandaj malperfektaĵoj estus sukcesinta se ĝi ne estus havinta *plibonigistojn*. Gi falis por ĉiam kaj neniam plu relevigos. Tiu morta falado estu al ni ekzemplo. Ni evitu tiun dangeron.

“ En la venonta Kongreso oni formos centran komitaton, specon de akademio, ne por plibonigi Esperanton ; tute kontraŭe por malhelpi la ŝangojn kaj plibonigojn kaj forigi la ‘ tuſistojn.’ Je tiu flanko ni devas esti trankvilaj, ĉar oni trovos sufiĉe da saĝaj defendistoj por kontraŭbatali tiujn kiuj intencus konduki Esperanton tra dangeraj vojoj.”

“ **Tra la Mondo**,” nova *ilustrita* revuo tute en Esperanto, kies unua numero

aperos dum la nuna monato, estos redaktata de nia konata kaj energia samideano, S-ro. A. Capé Montrosier. Ĝi provos plenigi la malplenan fakon de esperantista revuo *tutmonda* kaj *ilustrita*, penante per tio altiri aŭ konservi personojn, kiuj ne trovas sufiĉe da logajo ĉe revuoj tute literaturaj, malgraŭ ilia intereso. En “*Tra la Mondo*,” ĉiuspecaj legantoj : seriozaj kaj vanaj, viroj, virinoj, gejunuloj kaj infanoj, trovos rubrikojn speciale dediĉitajn al ili, kies intereso estos ĉiam granda, dank'al la vasta kaj diversa kunlaborantaro ebligata de nia internacia lingvo. La revuo konfidas al ĉiuj por ĝin helpi kaj permusi rapide plidikiĝi. Jara abono : Francujo. 7 fr., Alilande. 7 fr. 50 ĉe la Administracio, 15, Boulevard des 2 Gares, Meudon (Seine-et-Oise), France.

Sicilia Federacio Esperanta.—Ni ricevis de la suprenomita Federacio du longajn cirkulerojn. En la unua, la Federacio konigas sin antaŭ la tutmonda Esperantistaro, kaj en la dua, ĝia energia Prezidanto, D-ro. Nalli, anoncas, ke li estas tuj farota gravan paſon antaŭen por nia afero en Italijo. La Redakcio de la Itala kultura gazeto, *Sicilia Universitaria* (Esp.: *Sicilio Universitata*), konsentas eldoni ĝin dulingve, en Itala kaj Esperanto, se ni povas trovi 600 abonantojn. La revuo eldonigas duonmonate, kaj, kunesperantigite, ĝi enhavos 32 paĝojn. La prezo estos 6.50 lire por la Poſta Unuiĝo, kaj 8 lire por ceteraj landoj, kaj oni proponas eldoni la unuan Esperantistan numeron la 1^{an} de Aŭgusto. Oni devas sciigi sian intencion pri abono antaŭ la 15^a de Julio.

Ni kore esperas, ke multe de niaj legantoj respondos malavare je tiu alvoko kaj abonus la novan jurnalon. La Sicilia Federacio, kiu mem zorgos la sendon de la gazeto, resendos la monon en okazo de neeldono. Adresu : D-ro. Vitangelo Nalli, 495, Corso Catafimi, Palermo, Sicilio. S. N.

A COMFORTABLE, superior HOME offered
A one or two gentlemen in good house,
most convenient for City and West-end, near
Tube, train, and bus. Young society. Large
garden. Moderate terms.—46, Highbury Park,
N. (near Highbury Barn).

LINGVA AVENTURO.

La studado de la matematiko, de la logiko kaj de la stenografia arto, ĉiuj pligrandigis mian antipation je la studio de la gramatikoj angla aŭ alilingva, kun ĉiuj iliaj arbitraj distingigoj, senlogika ortografio kaj neregulaj verboj.

Mi abomenas iliajn nekonsekvencojn kaj faletigajojn por la spirito. Kiel ekzemple, rimarku la uzadon de nur du seksoj ĉe la franca kaj aliaj parencaj raso. Eble en la sendata kaj antaŭ-historia estinteco, kiam la homoj aljuĝadis al la nubo, arboj kaj ŝtonoj koncian vivon, la uzado de nur du seksoj estis pravigebla; sed, en la nuna tempo, tio ne estas racia, almenaŭ laŭ mia opinio, kaj, cetere, ĝi postulas ke la memoro estu ŝargata per serio da vortoj, laŭ ŝajno, virinseksaj tial, ĉar ili havas tiun aŭ alien ortografion aŭ ŝajne havantaj tian ortografion tial, ĉar ili estas virinseksaj.

Neniaj pretendoj determini la seksojn laŭ belsoneco estas konsekvenco pravigebraj, ĉar nepre *la mer* estas tiel belsona kiel *le mer*, kaj *la cheval* estas ne malpli harmonia ol *le cheval*. Mi estas tedita per reguloj plenaj je esceptoj kaj per esceptaĵoj, kiujn oni iamaniere ajn kredas havi la povon pruvi la regulon.

Prezentu do al vi mian plezuron, kiam mi entusiigis kun lingvo kies reguloj estas senesceptaj; kies ortografio estas fonetika; kies elparolado prezentas neniajn malfacilaĵojn por la alilingvuloj; lingvo, kies fundamento estas racia, logika kaj sciencia; lingvo, starigita sur la radikvortoj de niaj arjanaj prapatroj; lingvo, kies gramatiko kaj sintakso elmontras ĉe la gravaj lingvoj eŭropaj la travivadon de la plej taŭgaj el konkurrantaj aŭ similaj reguloj.

La maniero de mia konatigo kun tiu ĉi "kara lingvo" estis jene; antaŭ nelonge mi estis en unu el la apudmaraj urboj francaj. Kvankam, ekstere de la hotelo estas aviztabulo anoncanta ke la lingvo angla estas parolata, la mastro ne povis kompreni mian anglaĵon kaj, por plua konfuziĝo, mi ne povis sekvidati tion, kion li diris france. En la ĉambro, aro da sinjoroj interparoladis per ia fremda lingvo, kiun, pro ĝia muziksoneco, mi ekkredis esti

A LINGUAL ADVENTURE.

THE study of mathematics, logic, and phonography have each tended to increase my distaste for the study of English or foreign grammars, with all their arbitrary distinctions, illogical spelling and irregular verbs.

I abhor their inconsistencies and mental pitfalls. Take the case of the use of only two genders by the French and allied races. Perhaps in the undated prehistoric past, when men credited clouds and trees and stones with conscious life, the use of two genders was explicable, but nowadays it seems irrational and forces the memory to be burdened with a string of words which appear to be feminine because they are spelt in a particular manner and appear to be spelt in a particular manner because they are feminine.

The claims of euphony as a means of determining gender cannot be consistently maintained, for surely *la mer* is as euphonious as *le mer*, and *la cheval* is as musical as *le cheval*. I am wearied of rules subject to exceptions, and exceptions which are somehow or other supposed to prove the rule.

Imagine my pleasure, then, in being brought into contact with a language whose rules have no exceptions, whose spelling is phonetic, whose pronunciation offers no difficulties to "alien" tongues; a language whose basis is rational, logical and scientific, a language based on the root words of our Aryan forefathers, a language whose grammar and syntax represents the survival of the fittest among the competing or corresponding rules among the great European tongues.

The method of my introduction to this "kara lingvo" was as follows. I was recently in one of the French coast towns. Although outside the hotel there was a notice to the effect that English was spoken, the proprietor could not understand my English, and to add to the confusion I could not follow his French. A party of gentlemen were conversing in the room in a strange tongue, which by its musicalness I thought might be Spanish

la hispana aŭ itala lingvo, sed kiun mi ne povis trovi ĝuste identa je iu ajn el ili. Rimarkinte nian malfacilaĵon, iu el la grupo proponis al ni sian servon por traduki. Tuj malaperis niaj malfacilaĵoj. La hotelmastro parolis france kaj Esperante, la tradukinto parolis Esperante kaj angle, mi parolis angle. Jen ni havas ekzemplon pri la komerca utilaco de lingvo internacia.

Morgaŭan tagon, vidinte amikojn diversnaciajn, kvankam plejmulte nesciajn pri la patra lingvo de ĉiu alia, libere interparoladantaj, mi konvinkiĝis, ke granda parto de la malamikeco inter la nacioj kredeble naskiĝas kaj kreskas pro reciproka malkompreniĝo kaj nescio. Tia amikeco inter alilanduloj montriĝis antaŭ miaj okuloj, ke mi sentis min logata skribi la jenan toaston : "Mi trinkas al la bonsano de la Esperantistoj kaj al la plena sukceso de Esperanto, tutmonda amikaro, internacia *entente cordiale*, ĉea kamaradaro ; tra la tuta mondo, fratecon ; sur la terglobo, pacon kaj bonvolon al la homaro."

Tiujn ĉi ideojn mi petis amikon, ke li traduku Esperante. Mi elskribis liajn parolojn per la stenografio Pitman'a. Konstatinte, ke mia skribitaĵo estas ĝusta, mi legis laŭte la vortojn. Nu, la sonoj Esperantaj estas tiel simplaj kaj tiel diferencigaj ke ĉiu Esperantisto povis elkompreni ĉion, kion mi diris. Se estus estinta la unua fojo, kiam mi parolis per la lingvo franca, germana aŭ rusa, ĉu la francoj, germanoj aŭ rusoj povus min kompreni ? Mi kredas ke ne.

(*Tradukis E. A. M.*)

Esperanto.—(Rusa ĵurnalo). D-ro. Ostrovski, la redaktoro, sciigas per letero en *Lingvo Internacia* ke, pro neforigebaj malhelpaĵoj ĉe la eldonado de sia ĵurnalo, li estas devigata transporti la tutan aferon el Peterburgo en urbon Jalta, kio necesigas la tempon interrompon de ĝia elirado.

Esperanto.—Nova monata okpaĝa ĵurnalo verkita en Esperanto kaj hungara, ĵus aperis en Budapest. Jarabono 3.80 kr. por eksterlando. Adreso : S-ro. Marich Agoston, Papnövelde-u 6, Budapest IV.; aŭ ĉe Sek., B.E.A., 3s. 6d.

or Italian, but which I could not really identify as being either one or the other. Seeing our difficulty one of the party offered his services as interpreter. Instantly our difficulties vanished. The hotel proprietor spoke French and Esperanto; the interpreter spoke Esperanto and English; I spoke English. We have here an example of the commercial utility of "lingvo internacia."

On the following day, after seeing friends of different nationalities, most of them ignorant of each other's national languages yet engaged in a fluent conversation, I was convinced that much of the enmity between nation and nation is probably fostered by mutual misunderstanding and ignorance. I saw such friendship manifest between "alien" peoples that I wrote out a toast to the following effect : "I drink to the health of Esperantists, and to the good success of Esperanto, a world-wide fellowship, an international *entente cordiale*, a universal *camaraderie*; over all the world, brotherhood; on earth, peace and goodwill to mankind."

I asked a friend to translate these ideas into Esperanto. I took his words down in Pitman's phonography. After ascertaining that I had got them down correctly, I read the words out aloud. Now, the sounds in Esperanto are so simple and so distinctive that every Esperantist followed my meaning throughout. If I had spoken in French, German, or Russian for the first time, would the French, Germans or Russians have understood me ? I think not.

E. FLANDER ETOHELLS, F.Ph.S.,
A.M.I.Mech.E.

Por juĝi pri la tre praktika helpo, kiun nia afero ricevas de la registaro kaj publikaj societoj en Francujo. ni citas, el "Lingvo Internacia," ke la Komerca Sindikato de Auxerre jam dufoje monoferis por la tiea grupo, kaj ke la diversaj urbaj aŭtoritatuloj sin enskribis en ĝi. Plie, la "Association Française pour l'Avancement des Sciences" donacis du sumojn da 400 frankoj al la Pariza Esperantista Grupo, por kovri la elspezojn de la Espozicio en St. Louis.

KONSENTO ANGLA-FRANCA.

Trankviliĝu amikoj de la neŭtraleco, mi ne deziras eniri la eŭropajn politikajn aferojn; mi nur intencas montri al la mondo esperantista, kiel la Kanadanoj de longe jam solvis tiun problemon de l' interkonsento starantan inter du nacioj centjare malamikaj, t.e. la francoj kaj angloj.

Kiam, en 1763, per la traktaĵo Pariza, la reĝo de Francujo, "Louis XVa," cedis al Anglujo la tutan Kanadon, nur restis en Kanado sepdek-kvin-mil francoj malriĉaj kaj disjetitaj en la lando, la aliaj, la plej belaj floroj de la kolonio, reiris Francujon sur la anglaj velſipoj, kaj tiam Sinjorino Pompadour ĝoje ekkriis: "Fine, la reĝo povos dormi trankvile!"

Jes, sed se la reĝo povis trankvile dormi, kio do fariĝis el la forlasitaj francoj en tia sovaĝa lando?

Jen kion mi, Franckanadano, tuj rakontos al vi en kelkaj linioj.

Dum centjaro, sen ia komunika rimedo kun Francujo, ili tenadis en mano jen la tenilon de pafilo kontraŭ la atakoj de l' sovaĝaj enlanduloj, jen la tenilon de plugilo kontraŭ la suferoj de malsato. Plie, ili kreskiĝis, plimultiĝis kaj fariĝis tri milionoj da francoj, izolataj kompreneble, sed ĉiam konservintaj siajn francajn kutimojn, morojn, religion kaj lingvon tiajn, kiaj ili estis dum la regado de Louis XVa. Tiel glaciĝis kaj konserviĝis, ĝis nia epoko, la malnovaj mamutoj izolitaj ĉe la norda poluso!

Sed eble vi demandos: kial la angloj ne altrudis al vi siajn kutimojn, religion kaj lingvon? Ha! ĉe ili la deziro ne mankis pri tio, sed du kaŭzoj ilin malhelpis.

1. Dufoje Kanado estis minacata de la amerikana militistaro, en 1775 kaj en 1812. La Franckanadanoj, jurinte post la traktaĵo Pariza, ke ili estos fidelaj al Anglujo, dufoje batalis la enpenetrintan armeon kaj konservis Kanadon por Anglujo.

Tiu ĉi, devigite de la cirkonstancoj kaj de la timo ke ĝi perdos eble Kanadon, pliagrabliĝis kaj donis al ni

la rajton konservi niajn lingvon, religion kaj francan legaron. Poste ĝi permesis al ni la memregadon (self-government) kaj tiam, el kolonionoj, ni fariĝis preskaŭ aparta nacio, kun kiu aliaj nacioj, eĉ Anglujo, devas kalkuli en siaj komercaj traktaĵoj.

2. Post 1763, Anglujo sendis kompreneble multajn anglajn elmigrantojn al Kanado, kredante eble, ke per ili ĝi fine dronigos, en angla rondeglo, la francajn familiojn de Kanado. Sed, mirinde la malo fariĝis!

Efektive, el tiuj miloj da anglaj elmigrantoj, kiuj loĝiĝis en la provinco Kebeko, kiu tiam estis la plej loĝata, la plimulto da ili perdis siajn anglajn kutimojn, religion kaj lingvon post unu generacio, kaj fariĝis francaj Kanadanoj kiel ni, esceptinte la anglajn nomojn; kiujn ili konservis.

Jen kial, en Kanado, oni renkontas multajn personojn kun anglaj nomoj, kiel Smith, Macdonald, Ball, Craig, Fraser, k.t.p., kiuj ne povas paroli angle, kaj kies infanoj devas lerni la anglan lingvon en la lernejoj.

Ekzemplo pli bone klarigos tion al vi.

La lastan semajnon, en la Montreala juĝeo, franca juĝisto demandis atestanton tiele:

"Kia estas via nomo?"—Duncan Macdonald. "Cu vi deziras atesti en angla lingvo?"—Mi ne vin komprenas. Vi ne povas paroli angle?"—Ne. Ho! tamen via nomo estas tre angla?"—Jes, sed mia prapatro loĝiĝis en tiu provinco, mia patro, mi rememoras, povis kompreni kaj iom paroli angle, sed liaj infanoj ne sancis lerni la anglan lingvon."

Tiaj ekzemploj oftege prezentiĝas en nia Montreala juĝeo.

Car estas ĝenerala kredo en Eŭropo, ke ni parolas tie ĉi ian francan jargonon, mi devas tuj montri per alia ekzemplo, ke oni simple eraras, kaj ke nia nuna franca elparolo tre multe similas tiun de la francoj en Francujo.

Antaŭ du jaroj, estante en Parizo, mi eniris magazenon por ion aĉeti kaj parolante al komizo, mi demandis: "El kia departemento vi supozas min?" "Laŭ via elparolo," li diris, "mi kredas ke vi loĝas en la nordo." "Jes ĝuste," mi rediris, "sed en la nordo de Kanado!" La komizo mal-

fermis grandajn okulojn kaj ne povis min kredi.

Tie ĉi elstaras grava, demanda punkto. Kiel la Franckanadanoj akordigas la respekton al la angla regno kun la memoro pri la malnova franca potenco en Kanado?

